

Usono vetois rezolucian projekton de Sekureca Konsilio de UN pri statuso de Jerusalemo



Tropika ŝtormo rezultigis
morton aŭ malaperon de
80 homoj en Filipinoj

Zimbabva armeo deklaris
finon de milita agado
ekinta en novembro

Indonezio: samseksema
festo: 10 viroj kondamnitaj
je du jaroj da malliberejo

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Usono vetois rezolucian projekton de Sekureca Konsilio de UN pri statuso de Jerusalemo

La Konsilio opiniis, ke Israelo ne havas suverenecon super la tuta Jerusalemo p. 03

Ĉefo de UN kondamnas teroristan atakon en Pakistano

Kontraŭ preĝejo en la pakistana urbo Quetta p. 03

Unuiĝu por heredaĵo

Mobilizi tutmondan movadon p. 04

Tropika ŝtormo rezultigis morton aŭ malaperon de 80 homoj en Filipinoj

Pli ol 270 mil homoj el proksimume 60 mil familioj suferis p. 05

Zimbabva armeo deklaris finon de milita agado ekinta en novembro

Armeo kaj polico rekomencis normalan laboron p. 05

Indonezio: samseksema festo: 10 viroj kondamnitaj je du jaroj da malliberejo

Tiuj viroj figuris inter la 141 personoj arestitaj en majo p. 06

Paulo César PINHEIRO kaj la kanzona poezio

La brazila muzika movado bosanovo p. 07

Memoraĵoj de HIROHITO estis aĉetitaj de japano ĉe konkura vendo

Skribaĵoj koncerne al la japana agado kadre de la dua mondmilito p. 08

Hodiaŭe

Jolán FÖLDES p. 08

Usono vetois rezolucion projekton de Sekureca Konsilio de UN pri statuso de Jerusalemo

Usono lunde [18 dec 2017] vetois rezolucion projekton de la Sekureca Konsilio de UN pri la statuso de Jerusalemo.

Ĉiuj aliaj 14 membroj de la Sekureca Konsilio voĉdonis por la teksto redaktita de Egiptio. Sed ĉar Usono, kiu estas konstanta membro de la Sekureca Konsilio, havas vetoan rajton, la projekto ne povis esti adoptita.

Antaŭ la voĉdono, egipta ambasadoro al UN Amr Abdellatif ABOULATTA klarigis, ke la rezolucia projekto celas certigi, ke ajna intenco ŝanĝi la karakterizaĵojn aŭ demografian konsiston de la Malnova Urbo de Jerusalemo ne

havas efikon kaj estas nevalida kaj devas esti nuligita. Li aldonis, ke la projekto ankaŭ vokas al ĉiuj partioj ne establi diplomaciajn misiojn en Jerusalemo.

Usona ambasadoro al UN Nikki HALEY diris, ke tio estis la unua usona veto en la Sekureca Konsilio en pli ol ses jaroj. Ŝi diris al la Konsilio, ke ili faras tion kun nenia ĝojo, sed ili senhezite faras tion. Ŝi rezonis, ke ŝia lando havas suverenan rajton por decidi kie starigi sian ambasadorejon en lando.

Reprezentantoj de aliaj landoj en la Konsilio opiniis, ke Israelo ne havas suverenecon super la tuta Jerusalemo, kaj ke Jerusalemo estas problemo de definitiva statuso, kiu devas esti solvita de la israelanoj kaj palestinanoj per intertraktado.

Yu
Ĉina Radio Internacia



Ĉefo de UN kondamnas teroristan atakon en Pakistano

Ĝenerala Sekretario de UN, António GUTERRES, lunde [18 dec 2017] forte kondamnis la teroristan atakon kontraŭ preĝejo en la pakistana urbo *Quetta*, kiu mortigis plurajn homojn.

En deklaro publikigita de lia proparolanto Stephane DUJARRIC, GUTERRES esprimis siajn kondolencojn al la familioj de la viktimoj kaj deziris rapidan resaniĝon al la vunditoj. Li vokis alporti la

efektivigantojn de la atako al justeco.

Sinmortiga atakanto detonaciigis kunportitan eksplodaĵon ĉe la pordego de la preĝejo en la sudokcidenta pakistana urbo *Quetta*, kaj alia atakanto pafis al dimanĉaj preĝantoj kaj estis mortpafita de sekurectrupo. Almenaŭ ok homoj estis mortigitaj kaj dekoj da aliaj estis vunditaj en la atako.

La ekstremisma grupo Islama Ŝtato deklaris respondecon pri la atako.



Yu
Ĉina Radio Internacia

Unuiĝu por heredaĵo

Mobilizi tutmondan movadon

Nour kaj Bayan, du fratinoj de Damasko, kiuj forkuris de la milito en Sirio, nun loĝas en Parizo. Antaŭ la konflikto, "kultura heredaĵo tuŝis ĉiun senon, de la sento de malnovaj ŝtonaj muroj sub viaj manoj kaj la delikataodoro de jasmeno en la aero, al la melodio alvoko al preĝo resonanta en viaj oreloj," ili klarigas. La historio de ĉi tiuj du junaj virinoj, kiu reflektas iliajn personajn vidpunktojn pri kulturo kaj heredaĵo, estas unu el multaj dividitaj per *Twitter* fare de *Unite4Heritage* [Unuiĝu por heredaĵo], tutmonda movado lanĉita de Unesko en marto 2015. Ĝi celas mobilizi gejunulojn kontraŭstari la propagandon de violenta ekstremismo tra la noviga uzo de sociaj retoj. La ideon de la movado puŝis senprecedencaj lastatempaj atakoj je kultura heredaĵo - per la detruo de ĝihadistoj en *Nimrud* kaj *Hatra*, kaj precipe la prirabado de la Mosul-Muzeo en Irako. Fotaĵa-kaj-rakonta konkurso lanĉita en *Instagram* kaj *Facebook* ricevis pli ol 10 000 kontribuojn el la tuta mondo, ankaŭ de Sirio baldaŭ post kiam ĝi estis lanĉita, en julio 2015. Kelkajn monatojn poste, la kampanjo komencis atingi naŭ milionojn da homoj ĉiun semajnon, multaj el kiuj estas junaj. Ili utiligis *Unite4Heritage* kiel sian propran platformon por interŝanĝi historiojn kaj ideojn. En tre mallonga tempo, ĝi fariĝis tutmonda amasa

movado de gejunuloj. Esprimante alternativan diron el kion diras ekstremistoj, *Unite4Heritage* estas parto de "*Empowering Youth to Build Peace*" [Povigi gejunulojn por konstrui pacon], integrita en la Unesko-kadro por Agado.

Ĝi estas gvidata de la celo "ekipi junajn virinojn kaj virojn per scio, kapabloj kaj valoroj, kiuj ebligas al ili vivi pacan, konstruan kaj produktivan vivon, engaĝiĝi kiel respondecaj tutmondaj civitanoj kaj resti risortivaj al iu ajn formo de misuzo aŭ manipulado, inkluzive

radikaligon kaj violentan ekstremismon". Kiel diris Irina BOKOVA, Ĝenerala Direktoro de Unesko, "Hodiaŭ ni vidas la kreskon de nova generacio de ciferecaj indiĝenoj... Tro ofte, Interreto povas disponigi potencon laŭtparolilon por perforto".

"Ni devas juci la tutan povon de Interreto por paco, por plivastigi ŝancojn por dialogo kaj civila partopreno, por nutri kaj antaŭenigi junajn zorgojn kaj vidojn", ŝi substrekis. En tempo, kiam neanstataŭigeblej kulturaj heredaĵoj kaj kulturaj esprimoj estas pli kaj pli atakataj, *Unite4Heritage* kunvenigas junajn kaj civilajn organizojn, komunumojn kaj retojn, politikistojn, esploristojn, amaskomunikistojn, sociajn laboristojn kaj aliajn agantojn por trakti malamecajn problemojn kiuj influas iliajn sociojn kaj komunumojn.

Unesko-Kuriero 2017, n-ro 03
Tradukis Saed ABBASI



Tropika ŝtormo rezultigis morton aŭ malaperon de 80 homoj en Filipinoj

La filipina prezidentejo anoncis lunde [18 dec 2017], ke la tropika ŝtormo *Kai-tak* rezultigis morton aŭ malaperon de 80 homoj en centra parto de Filipinoj, kaj nun la influo malfortiĝas iom post iom en la lando.

Proparolanto de la prezidentejo Harry ROQUE diris lunde, ke la

tropika ŝtormo *Kai-tak*, kiu surteriĝis en la centra parto de la lando, jam rezultigis la morton de 31 homoj kaj malaperon de 49 aliaj en kelkaj provincoj.

La tropika ŝtormo estigis inundojn kaj terlavangojn. Pli ol 270 mil homoj el proksimume 60 mil familioj suferis de la katastrofo, kaj multaj pontoj, ŝoseoj kaj aliaj instalaĵoj estis difektitaj.

Yu
Ĉina Radio Internacia



Zimbabva armeo deklaris finon de milita agado ekinta en novembro

La Zimbabva armeo deklaris lunde [18 dec 2017], ke la milita agado komenciĝinta en novembro jam atingis la celon kaj estas finita nun, kaj armeo kaj polico rekomencis normalan laboron.

La Zimbabva armeo komencis militan agadon en frumateno de la 15-a de novembro. Ili komplete regis ĉefajn organojn de la registaro kaj anoncis, ke la celo de la milita agado estas elserĉi koruptajn oficialulojn el politikaj partioj kaj alporti ilin al justeco. La 21-an de novembro tiama prezidento Robert MUGABE deklaris demision, kaj en la sekva

tago, eksa vicprezidento Emmerson MNANGAGWA estis kandidatigita por la posteno de prezidento. La 24-an de novembro en la ĉefurbo Haroro MNANGAGWA ĵuris enoficiĝon kiel nova prezidento.



La Zimbabva armeo lunde [18 dec 2017] okazigis gazetaran konferencon. Philip Valerio SIBANDA, nova komandanto de la armeo, diris, ke la milita agado atingis sukceson; iuj koruptaj oficialuloj estis arestitaj, kaj iuj aliaj fuĝis el Zimbabvo. Li vokis la armeon kaj policon estis plu solidaraj, eviti korupton strikte plenumi

leĝojn kaj kontribui al disvolvado de la lando.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Indonezio: samseksema festo: 10 viroj kondamnitaj je du jaroj da malliberejo

Dek viroj estis kondamnitaj je du jaroj da malliberejo en Indonezio, ĉar ili partoprenis samsekseman feston en saŭno de Ĝakarto. Tio estas nova signo de presekuto suferita de la geja komunumo en tiu lando plimulteislama.

Tiuj viroj figuris inter la 141 personoj arestitaj en majo, dum interveno de la polico en konstruaĵo, en kio staras gimnastikejo kaj saŭno. Plejparte el ili estis malliberigitaj, sed ĵaŭdon [14 dec 2017], dek estis kondamnitaj, ĉar ili malobservis kontestatan leĝon, kiu luktas kontraŭ pornografio.

Ili estis «kulpigitaj pro ekshibicio, kolektiva kaj publika seksagado», indikas la juĝo.

La tribunalo de Ĝakarto-Nordo ankaŭ kondamnis la malliberulojn je monpuno po miliardo da rupioj (62 650 eŭroj).

Samseksemo estas laŭleĝa en Indonezio, escepte de Aceho, unu el la 33 provincoj de la arkipelago de Sud-Orienta Azio. Sed de jaro kaj duono, la polico uzadas la striktajn leĝojn kontraŭ pornografio kaj narkotaĵoj, por subpremi membrojn de la ege malplimulta GLATa komunumo.

La novaj kondamnoj estis kondamnitaj fare de pluraj organizaĵoj pri defendo de la homaj rajtoj:

«Tio estas misuzo de la leĝo kontraŭ tiuj viroj. Tio ne estas krimo, ili turmentis neniun», kritikis Andreas HARSONO, de la NRO *Human Rights Watch* (HRW).



De kelka tempo, la malamikeco kreskas kontraŭ la malgranda GLATa komunumo. Ministroj, konservativuloj kaj islamaj grupoj sin allasis publike al homofobiaj diroj.

En majo, ok viroj estis arestitaj en Surabajo, ĉar ili organizis gejan feston en tiu dua urbo de Indonezio.

Neniam Milito Inter Ni

Paulo César PINHEIRO kaj la kanzona poezio

Elstara parto de la brazila poezio kuŝas en la versoj de ĝia populara kanzontrezoro. Almenaŭ de tiuj kanzonoj, kiuj komponiĝis de post da 60-aj jaroj.

La brazila muzika movado bosanovo, kiu disvastiĝis mondscale per la artismo de altkvalitaj muzikistoj, tiris post siaj ŝatataj melodioj verkaĵojn de bonegaj poetoj.

Tiu tradicio, jam trovebla ekde la 20-aj jaroj en la universo de la sambo-stilo, influis postajn generaciojn de popolmuzikaj komponistoj.

La plej bonaj tekstoj de tiuj kanzonoj prezentas perfektan akomodon al la muziko. Ili enhavas trafan elekton de belsonaj vortoj, ili uzas ĉiujn rimedojn de la poezia lingvaĵo (aliteracion, asonancon, rimojn, lingvofigurojn) kaj samtempe ili ne perdas la freŝecon de verko, kiu celas esti libere kantata de popolamasoj.

Unu el tiuj poetoj uzantaj la popolan muzikon kiel vehiklon por poeziesprimo estas Paulo César PINHEIRO. Li estas multflanka artisto, sambisto, verkisto, muzikesploristo. Li partoprenis centon da kanzonpartneraĵoj, komponis pli ol du mil kanzonojn kaj lia verkaro disŝutas per la voĉo kaj ludado de la plej gravaj brazilaj kantistoj.

Por montri la simplan belecon de la stilo de Paulo César PINHEIRO, ni prezentas lian unuan famkonatan muzikpoemon *Viagem* (Vojaĝo), em kiu la poeto adiaŭas malĝojon por promeni kun sia muzo per valso plena de belaj imagbildoj.

Tiun kanzonon, tamen, li verkis estante nur 14-jara, antaŭmontrante talenton, kiu ankoraŭ floras tra la daŭra laboro de tiu artisto.

La traduko sekvas la prozodion de la originalo, do ĝi estas kantebla kaj povas esti taŭge uzata dum Esperanto-klasoj.

Vojaĝo



Paulo C. PINHEIRO kaj João DE AQUINO
Tradukis Cícero SOARES

*Ho, Malĝojo, min pardonu
mi vojaĝo-pretas
nun la Poezio
venis miaflanken
jam tagoheliĝas
ni vojaĝos for*

*Per rajdado senbileta
sur dorso malpeza
de l' malmola vento
vento devenanta
jam de malproksime
de la mara kor'*

*Ni vizitos belan stelon
de frua sunpleno
laŭdire perdita
en la frumateno
sed ĝi ja kaŝiĝas
per luda petol'*

*Sidu sur ĉi nuba helo,
mia poezio,
al nia orelo
portu kanton belan
ni aerprisemu
per muzikodor'*

*Kiom da flugiloj blankaj,
mia poezio,
dancas nian valson
tra l' ĉiel'. Kaj Dio
ĝin brode ornamas
per suna kolor'*

*Ho, min helpu, poezio,
Mi plukos liliojn
rozojn, adiantojn
tra verdaj ebenoj
nomataj ĝardenoj
de l' ĉelfavor'*

*Sed vi povas trankviliĝi
mia poezio,
ĉar ni turnalvenos
sur guidanta stelo*

*sub lunluma helo
de l' noktiĝa hor'*


*Kial ne l' eventualo
de reveno kuna
sur bruna ĉevalo
la nokta stalono
ĝia nomo – luna
fulmo de Amor'*

Cícero SOARES
Brazila Esperantisto, n-ro 359

Memoraĵoj de HIROHITO estis aĉetitaj de japano ĉe konkura vendo

La japana plastika ĥirurgo Katsuya TAKASU venkis konkuran vendon de la memoraĵoj de HIROHITO [裕仁 de la Ŝoŭa-Imperiestro (昭和天皇 [ŝō-ŭa ten-nō]), (* 29 apr 1901, † 7 jan 1989)] – skribaĵoj koncerne al la japana agado kadre de la dua mondmilito. Por tiu dokumento li pagis 275 mil usonajn dolarojn.

TAKASU ofte partoprenas japanajn televidprogramojn, kaj li estis riproĉita pro afiŝoj fare de li oktobre 2015 sur Tvitero, laŭdante naziojn kaj mildigante japanajn militkruelaĵojn,



sed li asertas, ke liaj vortoj estis intence miskomprenataj.

Al la novaĵagentejo “Reuters” TAKASU diris, ke aĉetis tiun manuskripton – ĝi estas konata kiel “*Solparolado de la Imperiestro*” – ĉar laŭ li ĝi enhavas mesaĝon al membroj de la imperiestra familio kaj al la japana popolo, kaj pro tio ĝi nepre restu en Japanlando.

La dokumento estis diktita en 1946 al iu asesoro de HIROHITO, kaj ĝi rakontas okazintaĵojn el la jaroj 1920, kaj la decido de la imperiestro ne kontraŭstari decidojn de sia konsilantaro. Tiu dokumento estis diskonigita en 1990.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



Jolán FÖLDES

FÖLDES Jolán (naskiĝis la 20-an de decembro 1902 en Kenderes; mortis en oktobro 1963 en Londono) estis hungara romanverkistino.

En Esperanto aperis: *La strato de fiŝanta kato*.

Vikipedio